

REDAKTORA VORTO



★

Vi estas esperantisto
(preskaŭ profesia esperanto).
Ĉu vi travivas pri estonto? Ĉesu!
Travivu pri nuno.
Venontaj problemoj nepre venos.
Venos tiel subite, ke vi eĉ ne
sukcesos ekpensi pri futuro.
Pripensu la pasintan jaron!
Ĉu ĝiaj lecionoj estis instruaj?
Ĉu vi ne similis al tiu, kiu revis esti
sata, ebrieta kaj amata,
sed sidis nenion farante?
Kiel strange – tiom da homoj evitas
laboron, sed ĉiuj deziras facilan
kaj distran vivon. Ili pensas (kaj vi?):
ne, mi tion ne faros, pri tio pli bone
okupiĝu iu alia.
Problemoj tamen aperas,
viaj problemoj kaj ĉu vi ekpensas pri
tio, ke ĝis nun vi, verŝajne,
okupis vin ne pri viaj aferoj.
Mi nenion konsilas, ja konsiloj pli
necesas por konsilantoj mem,
ol al la konsilatoj.
Mi tamen donu unu konsilon –
faru ion nun, por ke tiam,
kiam vi estos 70-, 80-, aŭ eĉ 90-jara
(se Dio permesos)
vi havu kion rememori kaj ĵurnalistoj
kion skribi en nekrologo,
ne nur ke vi estis esperantisto...

★

Vytautas Šilas /*Vi:taŭtas Ŝilas*

LITOVA STELO

Lietuvos žvaigždė

N-ro 1 (191)

januaro - februaro 2010, XX jaro

ENHAVO

- 2 Gratulo el sidejo de UEA
- 3 Vica litova E-kongreso
- 5 Laboranta por bono de EU
Z. BALČYTIS
- 10 Litovio en 2009
- 13 BET-paĝo
- 14 Esperantisto el Vejsejo
A. STABINGIS
- 16 Multflanka A. PRAPUOLENIS
- 21 Forpasis vortaristo
K. PUODĖNAS
- 22 Rememore pri O. ELINSKAITĖ
- 23 Homo de Toleremo
T. VENCLOVA
- 24 Ordinaraĵoj
- 25 Al Ameriko kun *Esperantotur*
- 27 Esperanto kaj afrikanoj
- 28 Fidela al Dio kaj Patrujo
A. SVARINSKAS
- 30 E-mozaiko
- 31 Ridetu kune
- 32 Abono al *Litova stelo*

La fotoj sur kovrilaj paĝoj –

sur la 1a – de Stasys PAŠKEVIČIUS

sur la 3a – de Jurgis ŠEDUIKIS

sur la 4a – de Virginija VALUCKIENĖ

SALUTMESAĜO

AL LA 45^a KONGRESO DE LEA

Estimataj kongresanoj,

En la nomo de Universala Esperanto-Asocio kaj en mia propra, mi elkore salutas vin, kiuj de la 12^a ĝis la 13^a de decembro partoprenas la 45-an Kongreson de Litova Esperanto-Asocio kaj la Zamenhof-Tagojn 2009.



Pro la ligiteco inter la historioj de Litovujo kaj de Pollando, vi certe sentis grandan jubladon dum la jubileaj eventoj en Pollando ĉi-jare. Mi ĝojis povi pliproksimiĝi al la litovaj geamikoj dum la ĉi-jara vizito, mia unuafoja – al la orienta parto de Eŭropo. Mi restas konscia pri la delonge konata reliefa rolo de la litova movado, unu el la plej sukcesaj landaj movadoj en la nuntempa Esperanta mondo. Mi deziras al vi daŭrigon de tiu impeta progreso antaŭen, en- kaj eksterlande.

Homoj ofte parolas pri malfortiĝo de la fakaj organizaĵoj. En via lando okazis reviviĝo de la ĵurnalisma agado. Mi proponas, ke laŭeble lando forta pri iu fako 'adoptu' ĝin. Ni povu diri, ke ĵurnalistoj esperantistaj orientas sin al Litovujo kaj inverse. Ĉu nerealisme? Tamen eble mia ideeto spronos kelkajn debaterojn dum via kongreso.

Amike

Probal Dasgupta
Prezidanto, UEA

*Prof. d-ro Probal Dasgupta
Linguistic Research Unit
Indian Statistical Institute
Kolkata, Hinda Unio*

LITOVA JARKONGRESO KAJ ZAMENHOF-TAGOJ

Finjare de 2009 Litova Esperanto-Asocio (LitEA) kunvokis esperantistojn al la 45-a kongreso de LitEA kaj al la tradicia ĉiujara renkontiĝo *Zamenhof-tagoj-2009*, nun dediĉita al la 150-a datreveno de naskiĝo de L.L. Zamenhof. Ambaŭ aranĝojn partoprenis 139 esperantistoj - ĉefe el Litovio kaj gastoj el Pollando (2) kaj Latvio (6). Litovaj esperantistoj venis el 22 urboj kaj loĝlokoj (el Kaŭno - 52, Vilno - 25, *Panevėžys* - 17, *Garliava* - 8, *Marijampolė* - 5, *Šiauliai* - 3, *Jurbarkas*, *Alytus*, *Klaipėda*, *Jonava* - po 2, *Šalčininkai*, *Elektrėnai*, *Pasvalys*, *Prienai*, *Šakiai*, *Palanga*, *Kaišiadorys*, *Naujoji Akmenė*, *Joniškis*, *Švenčionys*, *Vilkaviškis*, *Mažeikiai* - po 1).

La aranĝoj okazis la 12-13-an de decembro (sabato kaj dimanĉo) en la gebopatra urbo de la aŭtoro de Esperanto, en Kaŭno (*Kaunas*), en salono de lernejo pri komerco kaj entreprenado (str. *Vilniaus* 42). La lernejo (en kiu la samaj aranĝoj okazis en 2008) situas en malnova urboparto de Kaŭno nur je 300 metroj for de la Zilbernika Esperanto-Domo. La partoprenantoj sabate ricevis senpagajn tagmanĝon tie kaj tranoktadon en studenta loĝejo de Agrikultura universitato (tion pripagis LitEA!).

Sabate je la 12.00 komenciĝis kaj dum du horoj daŭris la kongreso de LitEA. La ĉefaj eroj estis la gratulmesaĝo de Probal **Dasgupta**, prezidanto de UEA (legu sur pĝ. 1) kaj revua raporto de Povilas **Jegorovas**, prezidanto de LitEA.

P. Jegorovas resume skizis la jarajn aktivecojn de litovaj esperantistoj ĝenerale kaj de LitEA speciale. Li substrekis, ke malgraŭ la jaro, malfacila pro ekonomia kaj financa krizo en la lando, kaj aliaj problemoj (perdo de asocia ejo en Vilnius, malsanado de Vilna respondeca sekretario Irena **Alijošiūtė**, manko de sekretario en Kaŭno k.s.) la agado daŭris. La asocio finfine ricevis parton de E-arkivo de Adomas **Vaitilavičius**. Dumjare okazis diversaj jubileoj pri diversaj gravaj E-datoj. Sukcesis tradiciaj E-entreprenoj: postpaska renkontiĝo "Rideto" (aranĝo de E-klubo "Ruto", *Šiauliai*), konferenco de litovaj E-jurnalistoj (en litovia praĉefurbo *Trakai*) kaj boatado tra Ignalinaj lagoj (kun E-programo, organizis Vilna E-klubo "Juneco"). Kiel la plej grava manifestiĝo estis notita la partoprenado de 53 litovaj esperantistoj en la sukcesa Bjalistoka UK. Tie koncertis E-ensemblo "Asorti" el *Visaginas*, prelegis Vytautas **Šilas**, ĵurnalistan kunvenon gvidis Audrys **Antanaitis**, dum Kleriga lundo aktivis Dalia **Pileckienė**. Sufiĉe multaj litovoj partoprenis en TEJO-kongreso kaj Katolika kongreso.

La prezidanto de LitEA resumis eldonan agadon. Aperis kvar libroj en Esperanto, du muzikaj kompaktdiskoj. Elstaris la verkokolekto de Petras **Čeliauskas** "El mia esperanta skatolo", stabile aperadis "Litova stelo", sed lamis dissendado. Plurajn E-eldonaĵojn aperigis esperantistoj de urbo *Panevėžys*.

P. Jegorovas aparte atentigis ĉiujn pri BET-46. Novembre li faris laboran viziton al la orientlitovia urbo *Visaginas* por esplori eblecojn organizi tie la tradiciajn internaciajn somerajn la 46-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-46).

Ni eksciis, ke P. Jegorovas estis akceptita far` de la urbestro de *Visaginas* Vytautas **Račkauskas**. La urbestro konsentis esti la alta protektanto de BET-46, aranĝos akcepton por kelkdeko da partoprenantoj de BET-46, prezentos financan helpon al BET-46. La urbo je sia kosto eldonos turisman informan libreton pri la urbo en Esperanto por

posta disdono al ĉiuj partoprenantoj de BET-46. Okazis ankaŭ renkontiĝo kun direktoro de la Profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado dr. Vytautas **Petkūnas**, en kies teknike moderne ekipitaj aŭditorioj funkcias ĉiuj aranĝoj de BET-46. Estis vizitita la ĉefa kulturcentro "Banga", kie eventuale okazos komunaj aranĝoj de BET-46 (inaŭguro, fermo, koncertoj k.s.), se la aranĝo estos sufiĉe amasa. Dum la vizito la prezidanton de LitEA akompanis lokaj esperantistoj Genadijus **Jefimovas**, Andriejus **Melnikovas**, Jelena **Pisĉikienė**, Edvardas **Pisĉikas**.

Dum la kongresa diskutado parolis Audronė **Maksimaitienė** el Vilno, Vilius **Šidlauskas** el *Panevėžys*, Jūratė **Bartaškienė** el Vilno, Lionginas **Vaičiulionis** el Kaŭno, Zenonas **Sabalys** el *Šiauliai*, Adomas **Skiežgelas** el *Klaipėda*, Arimantas **Račkauskas** el *Vilnius*, Birute **Rozenfelde** el Rigo.



Z. Sabalys



S. Sobanska, K. Svidenis, R. Dovidavičiūtė, E. Dvarionas

Posttagmeze komenciĝis programeroj de *Zamenhof-tagoj-2009*. Tiu-ĉi aranĝo okazis jam la 50-an fojon - la unua okazis en 1959 okaze de 100-jariĝo de L.L. **Zamenhof**. Festprelegon "Etna Litovio - naskiĝlando de Esperanto" faris la redaktoro de "Litova stelo" V. Šilas. Li deklaris, ke kvin urboj de etna Litovio estis proksime ligitaj kun la vivo kaj agado de L.L. Zamenhof – Bjalistoko, Vejsejo (*Veisiejai*), Vilno, Grodno (*Gardinas*) kaj Kaŭno. P. Jegorovas mallonge prezentis la novan biografian libron pri L.L. Zamenhof "Homarano" de Aleksander Korĵenkov - estis ĝi la rezulto de komuna kunlaboro de Kaliningrada eldonejo *Sezonoj* kaj LitEA (la aŭtoro, ve pro malsano, ne povis veni).

Okazis koncerto de esperantista ensemblo el Garliava sub gvido de Aldona **Grikienė** (kelkaj kantoj en Esperanto) kaj de instrumenta duo – kun sia lernanto Georgij **Štalbovski** ludis konata flutistino Lidija **Gomolickaitė-Grudzinskaitė**.


Sekvan tagon (dimanĉe) postrestintaj esperantistoj en amika rondo preparolis diversajn agadajn aktualaĵojn. La kunveno en Kaŭno ebligis al la partoprenintoj uzi la libroservon, daŭrigi abonadon de E-revuoj por la jaro 2010, aliĝi al la kongreso BET-46 kaj al la Havana UK. Eblis membriĝi en UEA, pagi membrotizon de LitEA k.s. Ankaŭ praktiki la internacian lingvon (ho, ne ĉiuj eluzis ĉi tiun eblecon). Kiel ajn, ĉiuj revenis al siaj hejmoj kontentaj pro renkontiĝo kun E-geamikoj.

Litova Stelo

LABORANTA POR BONO DE EŬROPO

– Zigmas BALČYTIS

Litovio, la membro de Eŭropa Unio, situas en geografia centro de Eŭropo, tamen en la senco politika la centro de Eŭropo estas Bruselo, la sidejo de Eŭropa parlamento. Kion faras litovoj en Bruselo? Ni renkontiĝis kun unu el dek du reprezen-tantoj de Litovio, kiuj laboras en Eŭropa parlamento, kun estinta ministro de Litova registaro pri trafiko, poste pri financoj, kun ekonomiisto kaj politikisto, kun 56-jara socialdemokrato Zigmas BALČYTIS. Li volonte respondis la demandojn de la revuo *Litova Stelo*.



LS: Estimata eŭroparlamentano, kiel komenciĝis Via politikista kariero?

Z. Balčytis: Interesa demando. Mi opinias ĉiu homo en certaj etapoj de sia vivo ŝanĝiĝas. Estis ni studentoj, komencis laboran agadon, starigis siajn vivocelojn. Poste ni komencis cerbumi ĉu estonte ni povos realigi ilin. Mi devis ŝanĝi multajn laborojn, mi laboris kaj pri publikaj servoj kaj pri privata entreprenado – mi estis direktoro de grandega privatigita entrepreno. Finfine mi komprenis, ke sendepende kie vi agu, precipe se en privata produktejo, via kapablo pri perfektigo dependas de tio, kiom vi povas hodiaŭ investadi por iu perspektivo. Mi komprenis, ke ĉe privata entreprenado ekzistas iu limo. Mi devis elekti, ĉu labori plu en ĝi, gajni nemalbonan salajron kaj ne esperi pri novaj scioj, aŭ iri al iu ŝtata servo (tie oni preferis pli junajn), aŭ direkti min al politiko. Ĉar mi jam antaŭe estis socie aktiva (en 1994 mi estis elektita al Vilna Urba Konsilio), oni proponis al mi kandidati por Sejmo (parlamento) de Litova Respubliko. Kandidati necesis en regiono de konservativula partio, kie iam gajnis nek reprezentantoj de Litova labordemokratia partio, nek tiuj de socialdemokratia partio. Estis 11 rivaloj, mi estis la 12a. La elekta kampanjo sukcesis – mi iĝis gajninto.

LS: Eŭroparlamentanoj laboras dividiĝinte ne laŭ landoj, sed laŭ politikaj konceptoj. Tamen, ĉu okazas iu dialogo inter litovaj parlamentanoj (eĉ el ses politikaj partioj)?

Z. Balčytis: Efektive, pro ideologiaj konceptoj ni en Eŭroparlamento estas dividiĝintaj laŭ politikaj grupoj. Tamen la ĉefa laboro okazas en komitatoj, same kiel ĉe ni, en Litova Sejmo. En ili oni priparolas tre konkretajn demandojn. Vere, ankaŭ en politikaj grupoj ni ilin priparolas. Tie ni renkontiĝas tri litovoj socialdemokratoj. Kun aliaj, plej ofte, nur en aerhavenoj, kiam ni ien flugas. Tamen ni havas eblecon ekvidi nin dum plenkunsidoj en Strasburo. Ni penas partopreni en ili kaj interŝanĝi opiniojn, tamen reprezentantoj de aliaj partioj ne ĉiam agas aktive. Ĝenerale, ni priparolas la plej aktualajn politikajn demandojn. Estas deliktoj de homrajtoj, ni traktis demandon pri postenigo de komisaroj. Ankoraŭ sufiĉa kunlaborado mankas, tamen estonte, mi kredas, ni estos pli aktivaj.

LS: Rigardante el Litovio tio kion faras eŭroparlamentanoj grandparte estas eksterlanda politiko. Ĉu nia Prezidentino almenaŭ iom influas funkciadon de litovaj reprezentantoj en la Eŭropa parlamento?

Z. Balčytis: Mi ne opinias, ke nia Prezidentino devus iel influi nin. Ŝi respondecas pri situacio enlanda kaj eksterlanda politiko de Litovio. Nin ja, membrojn de Eŭropa parlamento, la tuta Litovio elektis por reprezenti tutan Eŭropon en Eŭropa Unio. Ni ne povas diri, ke jen mi estas elektita de Litovio kaj mi reale defendos nur interesojn de Litovio. Neniel! Kaj germanoj kaj italoj kaj litovoj ankaŭ ĉiuj ceteraj devas zorgi pri komunaj Eŭropaj aferoj kiuj estas en nia kompetenteco. Mi ne dezirus aserti, ke ni okupiĝas nur pri eksterlanda politiko. La pli granda parto de nia laboro estas ligita kun tre konkretaj aferoj. Al Eŭropa komisiono ni prezentas diversajn solvopropojn, ekzemple, pri markado de pneŭmatikoj, problemo de Alzheimer malsano, manĝo-produkta informacio, ŝparado de elektra energio, konfirmado de buĝeto k.t.p. Post kiam oni akceptas certajn decidojn, ili post iamo devas esti enkondukitaj en ĉiu ŝtato de EU. Ankaŭ do en Litovio. Se nia Prezidentino opinios, ke estas bezono ŝin informi pri aferoj plenumitaj aŭ plenumataj, ni estos pretaj por tio. Mi opinias, ke iam ŝi nin invitos.

LS: La eŭrouniaj ŝtatoj devas sin apogi sur la principo pri supereco de eŭrouniaj leĝoj. Ĉu tiu supereco ne elvokas iujn problemojn por Litovio?

Z. Balčytis: Por ajna ŝtato la supereco de eŭrouniaj leĝoj estas demando de konstitucia diskuto. Pasinte estis problemoj pri konstitucio de EU pro tio, ke la ŝtatoj devis certan parton de siaj funkcioj komisii al Eŭropa Unio. Estas parto de eksterlanda politiko transdonita al nove fondita aparta institucio de EU, kiun gvidas la supera rajtigito de EU kaj komisaro pri eksterlanda politiko Catherine Ashton. Estas ankaŭ financa politiko, kiun ĉiam pli rigore reguligas la Eŭropa centra banko. Tiel la funkcioj de naciaj bankoj, ankaŭ de nia Litova banko iĝas limigitaj. Ĉio tio estas postsekvo. Ja por disdividi inter si la komunan Eŭropan "kukon", necesas ion fordoni por komuna entenujo. Tiel la demando pri supereco de eŭrouniaj leĝoj en iuj ŝtatoj restas tre akra.

La nuna Lisbona interkonsento (kiu anstataŭis la projekton de Eŭropa konstitucio) klare postulas, ke leĝoj, akceptitaj de EU, estu devige plenumataj de ĝiaj ŝtatemprojoj. Litovio aliĝis al EU en 2004, kaj antaŭ tio ĝi devis ŝanĝi multajn leĝojn, por ke tiuj konformu juron de EU. Ni mem akceptis tiun decidon kaj mi ne opinias, ke Litovio pro tio estis iel domaĝita.



En januaro 2010 inter la parlamentano Z. Balčytis kaj Litova ĵurnalista asocio (LŽS, la prezidanto D. Radzevičius) estis subskribita interkonsento pri informado. Surfote: la interŝanĝo de subskribitaj dukumentoj.

LS: Kiel ni scias, Vi estas inter kvin niaj plej aktivaj reprezentantoj de Litovio en Eŭropa parlamento. Pri kiuj demandoj Vi kutime elpaŝas?

Z. Balčytis: En la parlamento aperas diversaj demandoj gravaj por homoj. Jen, ekzemple, atento al Alzheimer-malsano, problemoj pri kanceraj malsanoj (ŝtatoj sindevigis prezenti informojn pri esplorado de kanceraj malsanoj). Mi esprimos mian pozicion pri deliktoj de homrajtoj. Pro internaj konfliktoj en Filipinoj pereis dekoj da homoj. Por preventi tion, EU devontigis sindevigon pri estimo de homrajtoj kaj homliberoj kaj nun prezentas subtenon al Filipinoj. Ni ja devas esti interesigitaj, ke la mondo iĝu civilizita. En kontraŭa okazo militoj kaj deliktoj de homrajtoj estus neeviteblaj. Ni estas interesiĝintaj, ke tio forestu ĉe niaj ekonomiaj partneroj. Antaŭ nelonge ni pridiskutis demandon pri kondamno de grava ĉina politikisto. La temo de miaj deklaroj estas demandoj de energetika sektoro kaj demandoj de buĝeta kontrolo. Temas pri efektiva spezado de monrimedoj liveritaj de ĉiuj civitanoj de EU, ne nur de litovaj impostopagantoj. Min interesas ankaŭ transportaj problemoj de Baltmaraj ŝtatoj. Mi parolas pri rapidŝoseo *Via Baltica*, kiu, ligu la ĉefurbojn de Baltmaraj landoj kun Varsovio kaj pri paralele lokigota moderna eŭropa relvojo *Rail Baltica*.

Mi scias, ke pri ĉi tiuj demandoj ne estas facile interkonsenti kun Pollando. Mi, kiel eŭroparlamentano, ne povas kontrakti kun polaj oficistoj de transporta sistemo. Tamen, mi antaŭpreparis interpelacion pri tio, ke se Litovio ŝanĝinte unu transportan projekton ŝparus monon de EU, la ŝparitaĵo restu por alia projekto. Tion postulas nuna ekonomia situacio de Litovio. Por entreprenistoj, kiuj nun transportas siajn produktaĵojn perŝipe, realigo de la projekto *Rail Baltica* estus precipe utila. Ja fervoja transporto estas tamen la plej sekura kaj la plej rapida.

LS: Ĉu en Europa parlamento sentiĝas lingva bariero? Kiel Vi interkompreniĝas kun Viaj eksterlandaj kolegoj?



Z. Balčytis: Povas esti, kiam al EU venis novaj ŝtatoj, elstaris rimarkelbla lingva bariero. Nun validas tre klara koncepto, ke devas esti certigitaj kondiĉoj, ke ĉiu eŭroparlamentano povu paroladi en lingvo de sia ŝtato. Do, praktike, tradukado okazas ĉie – dum laboraj debatoj, en komitatoj kaj en parlamenta salonego. Neakcepteble iĝas, kiam okazas interpretado, komunikadi ne en sia, sed en lingvo angla, franca aŭ alia. Ĉiuj esprimiĝas en tiu lingvo, kiun plej bone scipovas – en sia Patrina lingvo. Ja al aliaj oni prezentas precizan tradukon. En dudek sep landoj de EU funkcias 23 lingvoj, akredititaj interpretistoj tradukas vian parolon al ceteraj 22 lingvoj. Tradukistoj estas. Ili veturadas kaj tradukas en ĉiuj aranĝoj. Mi senpere kun

miaj gekolegoj parolas angle. Tial por mi kun angloparolantoj problemoj forestas. Vere, en Bruselaj kaj Strasburaj servoj regas la franca lingvo.

LS: Ĉu Vi havis okazon aŭdi pri la lingvo Esperanto, kreita por internacia komunikado? Kion Vi opinias pri neceso de tia lingvo?

Z. Balčytis: Pri lingvo Esperanto mi ne nur aŭdis, sed ankaŭ renkontiĝis kun ĝi pasinte en diversaj forumoj, kiam mi estis en aliaj laboraj pozicioj. Mi opinias, ke ĉi tiu lingvo estas ne sufiĉe uzata. Estus bone, se proksimtempe oni ekparolus pri pli vasta utiligo de Esperanto por internacia komunikado. Tio tre mankas. Se jam tiu lingvo estas kreita, investitis multe da intelekta potencialo kaj mono, ĝi devus estonte funkcii kiel efektiva internacia rimedo de interkompreniĝo. Ĝisnune ĝi estas pli uzata por komunikado de instruitaj homoj, aŭ simile. Se la lingvo funkcius ankaŭ en politika nivelo, mi opinias, multaj gajnus. Ja nun ni devas ellerni unu aŭ kelkajn fremdlingvojn aldone, tamen veninte al alia kontinento ni pri ili ne kontentiĝas. Pro Esperanto necesus pli malmultaj tradukistoj, la homoj pli bone interkompreniĝus, pli liberiĝus.

LS: Dankon pro la detalaj respondoj! Sukceson en Via parlamenta agado!

La parlamentanon *Zigmas Balčytis* paroligis redaktoro de
Litova Stelo Vytautas Šilas
La fotoj sur la paĝoj 7 kaj 8 – de Stasys Paškevičius

* + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + *



Esperantisto el Münster antaŭvidita kiel
nova germana ambasadoro en Moskvo

Pluraj germanaj gazetoj, inter ili la konata magazino "*Der Spiegel*", raportis, ke la nova germana registaro antaŭvidas sendi al Moskvo la ĝisnunan 59-jaran reprezentanton de Germanio ĉe NATO, s-ron Ulrich Brandenburg, kiel novan germanan ambasadoron. Tie li devus ŝanĝi nunan 63-jaran ambasadoron Dr. Walter Jürgen Schmidt, kiu estas traktata kiel nesufiĉe kritika diplomato.

S-ro U. Brandenburg dum 1984-1986 laboris en Leningrada ĝenerala konsulejo de FRG, poste ĝis 1988 li estis la unua sekretario en la Moskva ambasadorejo. Dum 2001-2003 Ulrich Brandenburg estis rajtigito pri Rusiaj, Kaŭkaziaj kaj Centroaziaj aferoj ĉe Germana ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ulrich Brandenburg estas ne nur membro de Germana Esperanto-Asocio, iama prezidanto de Germana Esperanto-Junularo kaj membro de la loka grupo en Münster, sed ankaŭ denaska esperantisto. Pri U. Brandenburg vidu (en la germana): <http://www.nato.diplo.de/Vertretung/nato/de/04/botschafter.html>

Rudolf Josef Fischer, fischru@uni-muenster.de

LITOVIO EN LA KRIZA 2009

elokventaj eventoj

La jaro **2009** jam pasis for, sed en la memoro de litovoj restis kelkaj elokventaj precipaĵoj de la pasinta jaro. Ni prezentu al vi kronologie kelkajn el ili.

JANUARO

La **1an** de januaro per luma, artfajra kaj muzika spektaklo Vilno estis proklamita Kultura ĉefurbo de Eŭropo por la jaro 2009.

La **12an** de januaro, lige kun antaŭvidata fermo de *Ignalina* nuklea elektrejo, Litova Sejmo (parlamento) akceptis leĝon, kiu ebligis fondon de dek-kvara – Energetika ministerio.

La **30an** de januaro la Litova Supera Administra Juĝo verdiktis, ke stratnomoj en Litovio devas esti skribataj nur en la ŝtata litova lingvo.

FEBRUARO

La **12an** de februaro Litovio komencis festi la 1000-jaran datrevenon, kiam en kroniko estis la unuan fojon menciita la landnomo LITOVIO.

La **12-15an** de februaro jam la dekan fojon okazis Vilna librofoiro. Prezentiĝis en ĝi preskaŭ 250 partoprenantoj el 10 landoj. Antaŭe tiun ĉi foiron partoprenadis ankaŭ LitEA.

MARTO

La **15an** de marto en Kultura centro de urbeto *Širvintos* (nordorienta Litovio)

okazis la tradicia Respublika festo de harmonikistoj. Konkuris eĉ 30 muzikistoj el tuta Litovio: el *Kaunas, Utena, Pakruojis, Vilnius, Alytus, Trakai, Panevėžys, Šakiai, Varėna, Molėtai, Ukmergė* kaj kompreneble el *Širvintos* mem. Jam la kvaran fojon venkis



harmonika reĝo Pranas Ulbinas el *Varėna* (sudorienta Litovio).

APRILIO

La **27an** premieroj de tri baltlandaj ŝtatoj (Estonio, Latvio kaj Litovio) interkonsentis pri elektoreta kuplo, kiu tra Balta maro ligos Svedion kaj Litovion. La projekton egalparte efektivigos energetikaj kompanioj de Litovio, Latvio kaj Svedio.

MAJO

La **6an** de majo venis al Vilno kun oficiala dutaga vizito Hispana reĝo Juan Carlos I kaj reĝino Sofija.

La **17an** de majo okazis elekto de Litova prezidento. Jam dum la unua balotado, venkinte ses kandidatojn, kun pli ol 68 % da voĉoj, gajnis eŭrokomisarino Dalia Grybauskaitė.

JUNIO

La 7an de junio en Litovio okazis elektoj al Eŭropa Parlamento. Al 12 eŭroparlamentanaj lokoj pretendis kandidatoj de 15 partioj. Plej multe da mandatoj (kvar) akiris la reganta partio Patruja Unio – Kristanaj Demokratoj de Litovio.

La 16an de junio Litova Sejmo akceptis leĝon pri *Prevento de neplenaĝuloj* kontraŭ influo de negativa publika informado. Inter diversaj limigoj de informado estis malpermesata informado enhavanta publikan agitadon por samseksamo. Eksterlandaj gejaj kaj lesbaj organizaĵoj akre protestis kontraŭ la leĝo kaj denuncis Litovan Sejmon eĉ en EU. Litova prezidanto Valdas Adamkus malaprobis la leĝon.

JULIO

La 12an de julio okazis inaŭguro de nova Litova prezidento – s-rino Dalia Grybauskaitė.

La 14an de julio Litova Sejmo malakceptis la malaprobbon de Litova Prezidento kaj denove akceptis la leĝon pri *Prevento de neplenaĝuloj*.

AŬGUSTO

La 18an de aŭgusto Litova Prezidento Dalia Grybauskaitė telefone parolis kun Rusa Prezidento Dmitrij Medvedev. Estis la unua oficiala parolo inter gvidantoj de Litova kaj Rusa ŝtatoj dum la lastaj ok jaroj.

La 23an de aŭgusto (la tago kiam en 1939 estis subskribita la krima Molotova-Ribentropa pakto) en baltaj ŝtatoj Litovio, Latvio kaj Estonio okazis solenado de 20-jara jubileo pri “Balta vojo”, kiam 650-kilometra homĉeno ligis la tri ĉefurbojn

(Vilnon, Rigon, Talinon) deklarante sin por liberiĝo de siaj landoj el jugo de Sovetunio.

**SEPTEMBRO**

La 16an de septembro komenciĝis ege populara, ne nur inter ŝatantoj de klasika muziko, televida konkurso de “Ora voĉo” sub la titolo “Triumfa Arko”.

Ekkonkursis 30 kantistoj (ne nur profesiuloj, sed ankaŭ amatoroj). La viva kantado okazis sub akompanado de Kaŭna simfonia orkestro, direktata de M. Pitrenas (pri li relegu en LS n-ro 2 de 2008).

La 28an de septembro en Bruselo la 33-jara verkistino Laura Sintija Černiauskaitė pro la romano “Kvėpavimas į marmurą” (Spirado al marmoro) ricevis literaturan premion (5 mil eŭroj). La honorigan ceremonion ĉeestis prezidento de Eŭropa komisiono Jose (Ĵoze) Manuel Barroso. La



premio garantias ankaŭ financon subtenon de EU por traduko de la verko al aliaj lingvoj.

OKTOBRO

La **25an** de oktobro la nombro de artikoloj de litova Viki-enciklopedio atingis la limon 300 000.

NOVEMBRO

La **24an** de novembro la Registara komisiono pri ekstremaj situacioj proklamis en Litovio gripan epidemion. Antaŭ tio gripa epidemio estis anoncita en 38 litovaj municipoj (el 60).

La **27an** Prezidento de Eŭropa Komisiono Jose Manuel Barroso antaŭan litovan financoministron Algirdas Šemeta enpostenigis kiel eŭrokomisaro pri kontrolo, doganoj kaj impostoj, batalo kontraŭ prifripnado.

DECEMBRO

La **10an** de decembro Litova Sejmo konfirmis ŝtatan budĝeton por 2010 eĉ kun 5-miliarda deficino.

La **22an** de decembro la Sejmo akceptis kompromisan amendon por la leĝo pri *Prevento de neplenaĝuloj*. Anstataŭ nocio pri malpermeso propogandi samseksamon estas enkondukita malpermeso pri publika

agitado por kiaj ajn seksaj rilatoj, kiuj negative influas psikan sanon kaj moralan evoluon de neplenaĝuloj.

La **29an** de decembro okazis finalo de kantista TV-konkurso "Triumfa Arko". Triumfis magistrantino de Muzika kaj



teatra akademio (Vilno), 24-jara soprano Ona Kolobovaitė el urbo *Visaginas* (tie okazos BET-46). En finalo ŝi plenumis arion de Gilda (Ĝilda) el opero "Rigoletto" de Giuseppe Verdi.

La **31an** de decembro, plenumante sindevigon antaŭ EU, Litovio ĉesigis funkciadon de Ignalina nuklea elektrejo.



Spektakla E-kanto. La 21an de februaro 2010 (dimanĉon), en la Litova Nacia Drama Teatro okazis la premiero de spektaklo "Planedo" laŭ E.GRIŠKOVEC. Reĝisoro kaj ludinto de la ĉefa rolo estas A.DAINAVIČIUS. Komponisto J.JURKŪNAS por la finalo verkis kanton en Esperanto "Vi estas maro" (laŭ teksto de W.AULD). Pri belsoneco de teksto kaj prononcado konsultis G.DEGĚSYS. Ĉefan parton kantis tre fama litova kantistino Jurga ŠEDUIKYTĖ. La komponisto skribis post la spektaklo: "Esperanto sonis kaj ekinteresis ĉiujn ege. Oni eĉ demandis: en kiu lingvo ŝi kantis?"

BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ –SUB AŬSPICIO DE UEA

Du prestiĝaj Esperanto-aranĝoj, ambaŭ kun longa tradicio, ricevis aŭspiciojn de UEA por ilia ĉi-jara okazigo. La Estraro de UEA donis tiun specialan statuson al la kongreso “46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj” en la litova urbo Visaginas (26n de junio – 4n de julio) kaj al la 26-a ARKONES en la pola urbo Poznano (24-26n de septembro).



La tradicio de Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) naskiĝis kiel Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro (ĈET) en 1959 kaj daŭras ekde tiam ĉiujare, escepte de du paŭzoj. Komence la partoprenantoj venis el la baltmaraj respublikoj, sed ekde la 3-a ĈET la aranĝo komencis altiri esperantistojn el la tuta tiama Sovetunio. Post la resendependiĝo de la baltaj ŝtatoj BET-oj iĝis vere internacia renkontiĝo kun riĉa programo, kiu ĉiam evoluas. Jen, ĉar ĉi-jare nemultaj membroj de TEĴA – Tutmonda esperantista-ĵurnalista asocio – veturos al la ĉefurbo de Kubo Havano (por partopreni la 95-an UK), dum la BET en la urbo Visaginas okazos neformala dutaga jarkunveno de TEĴA.

Ĝis komenco de marto 2010 al BET-46 jam aliĝis 126 esperantistoj el 16 landoj (Litovio, Latvio, Estonio, Rusio, Slovakio, Ĉeĥio, Germanio, Danio, Finnlando, Svedio, Belgio, Sud-Afriko, Argentino, Belorusio, Nederlando, Aŭstrio). El Litovio aliĝis homoj el 21 urboj. Sendube, multaj aliĝos fine de marto, ĉar finiĝas la dua aliĝperiodo kaj kutime homoj ĉiam aliĝas lastatempe, precipe nun, kiam eblas aliĝi rete. Ni antaŭvidas partoprenon de ĉirkaŭ 300 esperantistoj el preskaŭ 30 landoj.

Al la BET-46 venos multaj gravaj personecoj de la tutmonda E-movado. Pro ilia partopreno la programo de la kongreso certe fariĝos pli altnivela, riĉa, interesa kaj utila. Inter venontoj estas:

Aleksander KORĴENKOV - ĵurnalisto, redaktoro, zamenhofologo, eldonisto; Halina GORECKA – ĵurnalisto, redaktoro, eldonisto, gvidanto de E-societo en Kaliningrado; Aleksandro MELNIKOV – interlingvisto, verkisto, tre konata E-pedagogogo, esperantologo (li gvidos perfektigan E-kurson); Stano MARĈEK – redaktoro de la revuo de UEA "Esperanto", aŭtoro de multaj E-lernolibroj, tre fama E-instruisto, eldonisto (rektmetodaj E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, metodika kurso por kursgvidantoj, prelegoj pri E-instruado kaj gvido de kantolernado); Mikaelo BRONŜTEJN – elstara kantisto, tradukisto, verkisto, literaturisto, movada historiisto (li koncertos, prelegos pri kulturaj kaj movadaj temoj); Alejandro COSSAVELLA – ŝatata kaj fama E-kantisto, aŭtoro de kantoj, komponisto.

P.S. Pri BET-46: <http://www.esperanto.lt/>, pri ARKONES: <http://www.arkones.org/>

ESPERANTISTO ALBERTO EL ZAMENHOFA URBETO VEJSEJO

La 20-an de januaro 2010 elstara loĝanto de la sudlitova urbeto *Veisiejai* (en E-literaturo – Vejseje, Vejsejo), instruisto kaj esperantisto **Albertas Stabingis** atingis la **85**-jaran vivosojlon. Lokaj loĝantoj lin karakterizas tiel: li estas afabla, tre takta, erudiciulo, sen malamikemo al alipensantoj, estimanta opinion de aliulo, li multe helpis al aliaj homon en iliaj aferoj. Jen tia estas homa karakterizilo de esperantisto Stabingis.

A. Stabingis naskiĝis en 1925, en vilaĝo *Petroškai* (tiam subdistrikto *Seinai-Seiny*, nun distrikto *Lazdijai*), nur 3 km okcidente de *Veisiejai* mem. Lernis li en mezgrada lernejo de *Veisiejai*. Poste, en 1945 li finis gimnazion de urbo *Lazdijai* kaj eklaboris kiel instruisto de elementa lernejo. En 1952 li finis forestan studadon de historio en Vilna pedagogia instituto kaj fariĝis direktoro de mezlernejo *Veisiejai*. En 1959 sub lia gvidado, sur pitoreska bordo de la lago *Ančia*, estis konstruita trietaĝa konstruaĵo de la mezlernejo (ĝis tiam ĝi lokiĝis en kvar apartaj konstruaĵoj). Samtempe A. Stabingis instruis historion en la mezlernejo kaj loka terkultura lernejo.

A. Stabingis estis libroŝatanto kaj jam estante abituriento en sia persona biblioteko akumulis pli ol 300 librojn (eble tute ne hazarde lia edzino fariĝis *Vacė*, kiu laboris en Vejseja biblioteko). Lernolibron de Esperanto la juna A. Stabingis akiris jam en 1939, tamen nur en 1956 li konatiĝis kun esperantistoj kaj de tiam li restis fidela al la ideo de lingvo internacia.



La geedzoj Vacė kaj Albertas Stabingis

A. Stabingis distingiĝis pri damludo kaj ŝakludo. Do, en la mezlernejo zorgis li ne nur pri instruado de Esperanto. Li gvidis ankaŭ la rondetojn de ŝakludantoj kaj damludantoj (lia lernantino D. Čakaite estiĝis junulina ĉampionino de Litovio kaj reprezentis la landon en Monda ĉampionado).

Estis la jaro 1964 kiam direktoro A. Stabingis disponigis sian lernejon por okazigo de la 6-a BET (*Balta E-tendaro*, nun kongreso *Baltiaj E-tagoj*). Estis lia granda merito, ke tiam la urbeto ĉefstrato ŝanĝis sian nomon de *LTSR 10-meĉio* (10-jaro de soveta Litovio) al *L. Zamenhofo* kaj flankstrato de *Kranto* (Borda) al *Esperanto*. Ho ve, laŭ admono de komunistaj instancoj la nomŝanĝoj baldaŭ estis nuligitaj.

Ekde 1993 A. Stabingis instruis Esperanton al gelernantoj, partoprenis kun ili diversajn E-aranĝojn. Somere de 1994 en Litova instituto pri kvalifikigo de instruistoj li partoprenis perfektigan E-kurson por E-instruistoj kaj en la distrikta gazeto *Dzuku žinios* (sciigoj de dzukoj) aperigis E-lecionojn sub la titolo *Tarptautinės esperanto kalbos elementarus kursas* (Elementa kurso de internacia lingvo Esperanto).

Somere de 2001 la urbeto *Veisiejai* celebris sian 500-jariĝon. Unu el la gravaj jubileaj eventoj estis okazigo de scienc-praktika konferenco dediĉita al la jubileo de urbeto. Tiam la loka esperantisto instruisto Albertas Stabingis faris en ĝi apartan prelegon laŭ la temo "VEISIEJAI – naskiĝloko de Esperanto". Liaj prelego kun lia foto estis publikigitaj en la libro, dediĉita al la jubileo - "VEISIEJAI 500", (*Vilnius* 2001, la paĝoj 115-119).

La familio de A. Stabingis estis kvarpersona – la geedzoj havis gefilojn. La filo pasintsomere mortis, la filino loĝas, ŝajnas, en urbeto *Daugai*. Lastatempe la sano de la jubileŭlo eklamis. Tial ni deziru al li unue fortiĝon de la sano kaj, kompreneble, ĉiaman bonan humoron!

P.S. *Mi dankas al kulturaganto de Vejsejo fraŭlino Lina Klimavičiūtė, kiu prezentis materialon pri esperantisto Albertas Stabingis al "Litova Stelo".*

V.Šilas, redaktoro de LS

PROVERBOJ EN ESPERANTO

Revenos suno, sed ne hieraŭa tago.
 Ne taŭgas rapido por grava decido.
 Ĉiu leĝo kiel neĝo – povas ŝveli kaj degeli.
 Kiu provas, tiu trovas.
 Pro vorto agrabla lango ne doloras.
 Saĝa kapo duonvorton komprenas.
 Inter diro kaj faro estas maro.
 Ĉiu kial havas sian tial.
 Nur ĉe telero valoras kulero.
 Ne ĉio, kio multe kostas, multon valoras.
 Ne ĉiam feliĉo amikas kun riĉo.

ANTANAS PRAPUOLENIS – PEDAGOGO, ESPERANTISTO, ĜARDENISTO

Pedagogo kaj esperantisto Antanas Prapuolenis estas preskaŭ nekonata al nunaj legantoj de Litova Stelo. Iam la revuo publikigis lian mallongan biografion. Lia nomo estas menciata en artikoloj pri historio de Esperanto-movado.

A. Prapuolenis estis estrarano de Litova Esperanto-Asocio. Lia Esperanto-lernolibro estas la lasta, eldonita antaŭ la jaro 1940ⁱ.

Ĉi tiu rakonto pri Antanas Prapuolenis aperis surbaze de biografio, verkita de Povilas Stašysⁱⁱ kaj rememoroj de la gefiloj Algis Antanasⁱⁱⁱ kaj Aušra^{iv}.




Antanas PRAPUOLENIS / *Prapūolenis* naskiĝis la 1an de marto 1894 en vilaĝo *Brasta*, (municipo *Antanavas*, regiono *Marijampolė*). Liaj gepatroj havis nur 2-hektaran terparcelon. En la familio kreskis 5 infanoj. Tiuj 2 hektaroj ne povis nutri la familion, tial la gepatroj laboris kiel dungitaj laboristoj ankaŭ en grandbieno. La infanoj restis solaj hejme kaj kreskis senprizorge. Do, ne estas mirige, ke mizeron akompanis malfeliĉoj. Infanoj, precipe knaboj, dum diversaj tempoj estis emaj serĉi diversajn distraĵojn, iam eĉ tre danĝerajn por la vivo. Dum unu el tiuj, la frato Kazys dronis en laĝeto. Baldaŭ forpasis ankaŭ frato Vincas. Plenkreskis la plej juna Antanas kaj la fratinoj Ona kaj Marija.

Antanas siajn infancajn somerojn pasigis paŝtante brutaron de bienuloj. Nur vintre li povis frekventi elementan lernejon en *Ĉysta Būda* (vilaĝo en municipo *Marijampolė*). Krom tiuj kelkaj vintroj, li ne povis plu studi, ĉar devis perlabori por si la panon, helpi al la gepatroj. Dum vintraj monatoj li laboris kiel arbohakisto, somere dungigis ĉe bienuloj. Antanas revis plu kleriĝi. Dum tempo, libera de diversaj laboroj, li memlernis kaj sinpreparis por studoj en instruista seminario. La Unua mondmilito tamen ne permesis realigi la revon. Somere 1916 Antanas finis pedagogan kurson en *Marijampolė* kaj la 1an de septembro en elementa lernejo de *Ĉysta Būda* komencis sian instruistan karieron. Ekde la 15a de aprilo 1918 li laboris kiel lerneja direktoro en *Alesnykėliai* (*Simna* municipo, regiono *Alytus*). Poste sekvis direktorado en *Pasiekai* (municipo *Liubavas*), *Kvietiškis* (1922 09 01- 1924 08 31), *Suliamos Būda* (1924 09 01- 1927 12 31).

Konserviĝis interesa policeja dokumento, donita al A. Prapuolenis en marto 1922. Tiam li laboris en *Pasiekai* (1921 09 01-1922 08 31) kaj loĝis en vilaĝo *Salaperaugis*.

La dokumento atestas, ke: *Al civitano Antanas Prapuolenis, loĝanto de la vilaĝo Salaperaugis, municipo Liubavas, regiono Marijampolė estas permesate bicikladi. La permesilo validas ĝis la 31a de decembro 1922, fiska imposto estas pagita.*

Nuntempe la dokumento ŝajnas iom ekzotika, tamen tiam permesilo por stiri biciklon estis necesa. Tiutempe la vivo en vilaĝo *Salaperaugis* ne estis trankvila. La vilaĝo estis ĉe ŝtatlimo kun Pollando. La limo estis tre "breĉa". Ofte en la vilaĝon venis diversaj rabistoj, foje ili forportis eĉ ujon kun pana pasto. Vintre 1923-1923 venis el Pollando armitaj viroj, ili atakis magistratan kancelierejon en *Liubavas* kaj intencis mortpafi la urbetestron. Tiu ĉemizvestita, kuris al *Marijampolė* kaj atingis, ke en la municipon estu senditaj policistoj por gardado de la ŝtatlimo.



En la jaro 1927 A. Prapuolenis edziĝis al Marija Geniušaitė (1898-1952), la instruistino de elementa lernejo en *Plokščiai*. La 30an de junio 1927 en preĝejo de Vytautas la Granda en *Kaunas* la geedziĝon konsekris kanoniko, fama verkisto kaj populara pastro Juozas Tumas-Vaižgantas. Algis Prapuolenis diras, ke por li kaj lia parenkaro eĉ hodiaŭ estas enigmo, kiamaniere la instruisto malriĉuldevena sukcesis ricevi edzinon belulinon el riĉa familio^v.

Ekde 1928 la nov-geedziĝintoj komencis labori en lernejo de *Kazlų Rūda*. En la mondon venis filino Antanina Danutė^{vi}, poste filo Algis. Vivkondiĉoj por la familio ne estis favoraj kaj ili decidis serĉi pli bonan laborlokon. Baldaŭ A. Prapuolenis sukcesis trovi direktoran oficon en nove konstruata lernejo en *Ižlaužas* (nuntempe en distrikto *Prienai*), 25 km for de *Kazlų Rūda*, kun instruista loĝejo. Li komencis labori la 1an de

aprilo 1933. Decembre Marija kun gefiloj translokiĝis al Antanas. Ĉi tie li loĝis kaj laboris pli ol 13 jarojn (1933 04 01-1946 08 31). Poste la familio translokiĝis al *Kaunas*. A. Prapuolenis devis forlasi la provincon pro reala minaco esti arestita de sovetaj sekurecorganoj. Lernojaron 1946-47 A. Prapuolenis komencis instruante en elementa lernejo de Kaŭna urbodistrikto *Freda*. Du jarojn li laboris kiel instruisto, poste estis nomumita direktoro de la lernejo. Ĉi tie li laboris ĝis la emeritiĝo.

Antanas Prapuolenis ne havis eblecojn studi en iu supera lernejo. Li ricevis eĉ ne gimnazian edukadon. Eble pro tio li fervore klerigadis sin memstare, ankaŭ en diversaj kursoj. Li perfektigis en someraj kursoj por instruistoj en *Marijampolė* (1916, 1919-1923). Dum 1934-1935 Antanas ekzameniĝis laŭ mallongigita programo en Ŝtata Ekzamena Komisiono, kvankam la 18-an de aprilo 1929 al li jam estis atribuitaj atesto pri klereco kaj titolo de lerneja instruisto. Krom la pedagogiaj, li studis ankaŭ en aliaj kursoj. En 1926 li partoprenis korespondan kurson por reporteroj kaj pli ol 3 monatojn frekventis kurson pri agrikulturo. Rimarkinde, ke li aktive aplikis akiritajn sciojn en la vivo. La kurso pri agrikulturo instigis lin ekinteresiĝi pri abelbredado, florkulturo, ĝardenkulturo. Laborante en *Kazlų Rūda*, A. Prapuolenis klopodis pri priplantado de la urbeto. Li longan tempon gvidis Rondeton de Junaj Terposedantoj. Kun membroj de la rondeto li kreskigis ĝardenajn kaj dekorajn arbojn, instruis kiel planti, kiel prepari la grundon ktp. Laborante en *Išlaužas*, sur 4-hektara lerneja parcelo A. Prapuolenis kreis grandan plantvartejon. Kontraŭ ricevataj enspezoj li aĉetis 10-hektaran parcelon en *Pakuonis* (distrikto *Prienai*), tamen familio de Prapuolenis ne longe uzis ĝin, ĉar post okupado de Litovio fare de Sovetio, la parcelo estis forprenita kaj transdonita al kolhozo.

Laŭ la filo Algis Prapuolenis, pri la patro kiel ĝardenisto, taŭgis proverbo: *Ĉe ŝuisto la ŝuo estas ĉiam kun truo*. En la plantvartejo pomarboj ne multis. Sinjoro Algis memoras, ke kutime pomoj sufiĉis nur ĝis la Kristnasko. Tamen por Antanas Prapuolenis gravis la ideo, ke litova loĝantaro plantu kaj prosperigu ĝardenojn. Ofte li persone donacis fruktarebetojn al najbaroj. La filo rakontis, ke la patro ŝatis komunikadi kun homoj. En sia trivita instruista teko inter kajeroj kaj libroj ofte estis pomoj. Veturante per aŭtobuso aŭ trajno li regaladis kunvojaĝantojn per pomoj kaj tiamaniere ĝermigis konversacion pri ĝardenoj, karakterizadis pomojn, konsilis, kie oni povas akiri pomarebetojn ktp.

La reportera kurso helpis al A. Prapuolenis polemiki en la antaŭmilita litova gazetararo. Tiel li publikigadis diverstemajn artikolojn en la gazetoj *Mūsų Rytus* (Nia morgaŭo), *Tautinė mokykla* (Nacia lernejo).

En antaŭmilita Litovio la instruisto estis disvastiganto de kulturo en la vilaĝo. Ankaŭ A. Prapuolenis estis ĝuste tia instruisto. P. Stašys skribas, ke li aktive partoprenis en agado de *Societo por Pribeligo de Litovio*, en ĝi estis membro de revizia komisiono. Post morto de ties aktiva membro, verkisto Juozas Tumas-Vaižgantas, la societo laŭ propono de A. Prapuolenis, estis titolita je nomo de J. Tumas-Vaižgantas.

A. Prapuolenis konservis neŭtralan politikan orientiĝon. La 1an de januaro 1933 li skribis leteron al ministro pri klerigo kun proponoj ĉe elementaj lernejoj fondi bibliotekojn por lokaj junularo kaj loĝantaro kaj malpermesi al la instruistoj partopreni en politikaj organizoj. Ĉi-lastan proponon li motivis tiel: la instruisto ne povas aparteni samtempe al ĉiuj lokaj organizoj, kaj kiam li apartenas al iu unu, gvidantoj de aliaj organizoj konsideras lin sia kontraŭulo, kaj tiam komenciĝas diversaj denuncoj kaj intrigoj.


A. Prapuolenis ankaŭ instigis eldonadi revuon por senpartiaj pedagogoj. Tiutempe en Litovio estis eldonataj eĉ tri pedagogaj revuoj politike diversorientitaj.

Pri la internacia lingvo Esperanto A. Prapuolenis ekinteresiĝis en 1920. Jam en 1922 li organizis E-societon en *Marijampolė* kaj du jarojn ĝin prezidis. En 1923 A. Prapuolenis ekzameniĝis en Litovia Universitato (*Kaunas*) kaj akiris ateston pri rajto instrui Esperanton. Li propagandis Esperanton per prelegoj, artikoloj en nacilingvaj gazetoj, kunlaboris en *Litova Stelo*, agitis najbarojn lerni Esperanton. P. Stašys mencias leteron de A. Prapuolenis al franca samideanino, en kiu li skribas, ke li kun loka katolika pastro iom lernigis laktistinon je Esperanto kaj petas trovi korespond-amikon por ŝi. Por Esperanto li avaris nek monon, nek tempon. Kiel li mem diris: *Por la mono, kiun mi elspezis por Esperanto, oni povus minimume grenejon konstruigi*. Verŝajne plej granda kontribuo de A. Prapuolenis estas broŝuro *Pasaulinės kalbos klausimas ir esperanto* (Problemo de la monda lingvo kaj Esperanto) kaj lernolibro por litovoj *Esperanto kalbos vadovėlis* (Lernolibro de Esperanto), eldonitaj en 1936.

A. Prapuolenis uzis Esperanton ankaŭ por ĝardenista hobbio. Korespond-amikoj A. D. Borisoglebskij, F. Ŝvedova, Savelova el Miĉurinsk (Sovetio) sendis ŝosojn ricevitajn de I.V. Miĉurin^{vii} mem. La filo Algis rakontis okazintaĵon el korespondado de la patro. Foje venis sendaĵo el eksterlando. En la poŝtejo li rimarkis, ke pakpapero estas enŝirita, tial Antanas elpakis la sendaĵon surloke. Kaj kia estis surprizo por la ĉeestantoj, kiam li eltiris rozan beban pantaloneton! Ĝin donacis sveda korespondamikino al antaŭnelonge naskiĝinta filino Auŝra.

A. Prapuolenis aktive entiriĝis en Esperanto-movadon. Kvankam li loĝis en provinco, li tamen konstante renkontiĝis kun Kaŭnaj esperantistoj. A. Prapuolenis estis vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio (1936-1937), ĝia estrarano (en 1932, kaj dum 1936-1939), partoprenis en Universalaj Kongresoj de Esperanto en Germanio kaj Svislando. Li kun aliaj reprezentis Litovian esperantistaron en la 4a Kongreso de Unuiĝaj Asocioj de Estonio, Latvio kaj Litovio (*Riga*, la 16-19 de junio 1938).

En 1940 Litovio estis okupita kaj Esperanto estis malpermesita por 16 jaroj. Post la Dua milito A. Prapuolenis laboris en *Iŝlaužas*. Inspektistoj pri kontraŭincendia protekto kontrolis subtegmentejoj de la lernejo kaj trovis tre "danĝerajn" materialojn: antaŭmilitajn litovlingvaj kaj fremdlingvaj librojn, revuojn, gazetojn. Inter ili estis ankaŭ kelkaj



pakoj kun libretoj eldonitaj de A. Prapuolenis mem. Tiam en la lerneja korto estis bruligita granda librofajro ... Sovetaj oficuloj la fajreron, kiun povis kaŭzi tiuj legaĵoj en la animo de eblaj legontoj timis pli, ol incendion de lerneja konstruaĵo...

Aŭtune 1956 en Soveta Litovio organiziĝis unuaj lingvoinstruaj E-rondetoj. A. Prapuolenis aliĝis al rekreo de E-movado. Li propagandis Esperanton, instruis ĝin en Kaŭna Korpokultura Instituto. La filo Algis havas litovlingvajn manuskriptojn de la patro: *Istorinē kalbų vystymosi raida nuo Babelio iki šių dienų Esperanto* (Historia evoluo de la lingvoj de Babelo ĝis nuntempa Esperanto), *Istorinē kalbų vystymosi raida ir bendrinės bei tarptautinės kalbų problemos* (Historia evoluo de la lingvoj kaj komunaj kaj internaciaj lingvaj problemoj), *Tarptautinės kalbos problemos* (Problemoj de la internacia lingvo), *Istorinē kalbų vystymosi raida nuo senovės iki šių dienų* (Historia evoluo de la lingvoj ekde antikvo ĝis nuntempaj tagoj), *Šis tas apie Esperanto kalbą* (Iomete pri lingvo Esperanto). Kvankam datoj ne estas indikitaj, tamen laŭ enhavo oni povas supozi, ke la unua manuskripto estas verkita post la jaro 1956, ĉar A. Prapuolenis priskribas Esperantorenaskiĝon en Litovio dum la soveta periodo. Algis Prapuolenis supozas, ke la patro verŝajne estis tre singardema, ĉar en la manuskriptoj li mencias nek sian esperantistan agadon, nek nomon de sia filino Auŝra, kiu organizis en Vilna Pedagogia Instituto Esperanto-rondeton kaj dum iu tempo estis ties gvidantino.

Antanas Prapuolenis partoprenis en la 3a Baltia E-tendaro en *Molėtai* (1961). Al tendaranoj, kiuj ne havis E-insignojn, li disdonadis verdajn kartonajn steletojn, kiujn li faris estante en hospitalo. Forpasis Antanas Prapuolenis la 30an de junio 1962. Kaŭzo de la morto estis tro malfrue diagnozita odontogena sepsemio. Antaŭ tio li estis kuracata de abdomena tifo. Li estas enterigita en tombejo *Petrašiūnai* (Kaŭno), apud la edzino Marija. Algis Prapuolenis rakontis, ke la patrino ne scipovis Esperanton, tamen ŝi ĉiam subtenis la edzon en liaj laboroj, aprobis kaj aprecis la ideon kaj celojn de la internacia lingvo.

Antanas GRINCEVIČIUS

¹ La 15-16an de junio 1940 Litovion okupis kaj poste aneksis Sovetunio.

¹ Pri Povilas Staŝys (1901-1997) legu en *Litova Stelo*, n-ro 2, 1997, p. 24. La biografion de A. Prapuolenis li verkis la 7an de februaro 1968. Auŝra Prapuolenytė ĝin ricevis de Ipolitas Cieška.

³ Algis Antanas Prapuolenis – doktoro de teknikaj sciencoj, eksa longdaŭra direktoro de nuntempa Inĝeneria Instituto ĉe Agrikultura Universitato en *Raudondvaris* (distrikto *Kaunas*).

⁴ Auŝra Prapuolenytė-Kijauskienė studante en Vilna Pedagogia Instituto (nuntempe universitato) organizis kaj dum iom da tempo gvidis E-rondeton, tamen mem la lingvon ne ellernis.

⁵ Cetere, familinomo *Geniušas* jam longan tempon famas en muzika vivo de Litovio. Rimas Geniušas (1920), la nevo de Marija Prapuolienė, estis longjara ĝenerala direktanto en Litovia Opera kaj Baleta Teatro. Lia filo Julius (1962) estas profesoro kaj ĝenerala direktoro de Kaŭna Muzika Teatro. Alia filo Petras (1961) estas fama pianisto, profesoro. Juna talenta pianisto Lukas Geniušas (1990) estas filo de Petras Geniušas.

⁶ Antanina Danutė Prapuolenytė-Maksimaitienė – kuracistino, doktoro de medicinaj sciencoj.

⁷ Ivan Vladimirovič Mičurin (1855-1935) estis rusa biologo kaj selektisto, aŭtoro de multaj specoj de kulturaj frukt- kaj berplantoj, akademiano.

Forpasi s vortaristo PUODĒNAS

Ne ĉiuj litovaj esperantistoj havis la okazon renkontiĝi, persone ekkoni vortariston Kostantinas PUODĒNAS /*Pŭodenas*, tamen ĉiuj konsultis lian vortaron Esperanto-litovan kaj litovan-Esperantan, kiun oni titolis simple – “vortaro de Puodĕnas”, aŭ eĉ simple – “Puodĕnas”. Sciu do, li, unu el la plej elstaraj litovaj esperantistoj, forpasis la 22-an de decembro 2009 post longa malsano, en sia 87-a vivojaro.

Konstantinas Puodĕnas (naskiĝis la 11-an de marto, 1923 en litova urbo *Rokiškis*). Li esperantistiĝis en 1938. Ekde 1959 li estis multjara senŝanĝa sekretario de Esperanto-klubo de *Vilnius*. Profesie li estis ekonomiisto kaj sian tutan vivon laboris kiel financisto kaj librotenisto. Li studis ankaŭ litovan filologion en Vilna universitato. En Esperanto-movado lia ĉefa merito estas kompilado de vortaroj kaj tradukado - en 1969 aperis lia esperanta-litova vortareto kaj en 1988 en prestiĝa eldonejo "Mokslas" estis eldonita lia dudirekta esperanta-litova kaj litova-esperanta vortaro, kiu ĝis nun estas ĉefa vortaro por litovoj. Multe pli ampleksa lia dudirekta manuskripta vortaro estas konservata ĉe Litova Esperanto-Asocio. Li tradukis ampleksan konsternan romanon de litova verkisto Balys SRUOGA "Arbaro de Dioj" pri nazia koncentrejo kaj kelkajn rakontojn de litova verkisto Antanas VIENUOLIS. Li plenumis ankaŭ multajn aliajn esperantistajn laborojn – recenzis lernolibrojn, verkis instruan programon de Esperanto por litovaj mezlernejoj k.s.

Kiel atentigas nin nia Vilna s-no Antanas Grincevičius: “Ne ĉiu povas kaj kapablas verki vortaron, des pli la lingvan. Tial jam pro tio la kontribuon, kiun faris K. Puodĕnas por litova E-movado, ne eblas troigi”. La entombigo de Konstantinas PUODĒNAS okazis la 23-an de decembro en Vilna *Rokantiškės*-tombejo. Eble oni povas konsenti kun s-ano Valdas BANAITIS, ke nin forlasis la lasta el la 3-a Esperantista generacio, la lasta el tiuj, kiuj ellernis Esperanton antaŭ la Dua mondmilito”.

A. Grincevičius nekrologas tiel:

*Tiuj, kiuj mortis, neniam malaperas:
Ili estas en ombro malumiĝanta.
Ili estas en la arboj, kiuj susuras,
Ili estas en la ligno, kiu veas,
Ili estas en la herboj, kiuj rosas,
Ili estas en la arbaro, ili estas hejme,
La mortintoj ne estas mortintaj.*

Povilas JEGOROVAS,
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Rememore pri samklubanino



2009.12.23 samideanaro de E-klubo "Ruto" akompanis al la lasta ripozloko, la tombejo sur la strato K.Donelaičio, la plej aĝan klubaninon Ona ELINSKAITĖ.

O. Elinskaitė naskiĝis 1928.10.24 en la vilaĝo *Zmirkliai* (regiono de *Joniškis*) en familio de terkulturistoj. Fininte la mezlernejon en urbeto *Meškučiai*, ŝi 1950 venis al *Šiauliai* kaj preskaŭ tutan sian vivon laboris kiel trikaĵlaboristino en la urba uzino „Verpstas“.

En 1984 O. Elinskaitė finis E-kurson, gviditan de eminenta instruisto de la internacia lingvo V. Vaitekūnas.

Post la fino de kurso Ona sincere enverŝiĝis en la klubagado: vizitadis kunvenojn, partoprenis en tradiciaj E-taj kunflugoj „Rideto“, en ekskursoj, abonadis kaj legis revuon „Litova stelo“ kaj elkore plenumadis ĉiujn klubtaskojn. Pro tio ŝi restos por ĉiam en la memoro de geklubanoj.

Membroj de E-klubo „Ruto“ de urbo Šiauliai

* + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + *

UNIVERSALA KONGRESO EN HANOJO EN 2012

La elekto de vjetnama **Hanojo** kiel la urbo de la **97-a Universala Kongreso de Esperanto en 2012** estis rimarkinda decido de la Estraro de UEA. Ĝis la lasta momento ankaŭ la korea urbo *Busan* konkuris kun alloga oferto. Post longa diskuto la Estraro decidis favore al la vjetnama ĉefurbo. La E-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.

La nuna Estraro kunsidos ankoraŭ dum la ĉi-jara UK en Havano, kie ĝi tamen traktos nur lastajn teknikaj detalojn de la kongresa programo.

La decido de la UEA- estraro pri la okazigo de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo en 2012 vere ĝojigas vjetnamajn esperantistojn, kiuj atendas ĝin jam delonge. Ni ne dubu, ke vjetnamaj samideanoj okazigos la kongreson sukcese kaj brile.

Tomas Venclova – Homo de Toleremo

Publika organizo *Fondaĵo de Sugihara – Diplomatoj por la Vivo* informis, ke la titolo



Homo de Toleremo de la Jaro 2009 estas atribuita al la poeto, publicisto, tradukisto kaj literatura esploristo, profesoro de Jeĵla universitato en Usono (Yale University) **Tomas VENCLOVA**.

T. Venclova estas la naŭa, ricevinta tiun titolon. Ĉi tiun honornomon oni atribuas al la persono, kiu per siaj agoj, publika ekzemplo aŭ la publika vorto kontraŭstaris fenomenojn de ksenofobio, antisemitismo, persekutadoj de aliuloj pro ilia opinio, religio, nacieco, elpaŝis kontraŭ fenomenoj de perforto, trudego kaj radikalismo.

En intervjuo al ĵurnalistoj de amaskomunikiloj T. Venclova menciis, ke li estas **alergiema** pri certaj fenomenoj:

Mi estas alergiema al ŝovinismo, inklude ankaŭ antisemitismojn, tamen tute ne nur al ĝi. Mi estas ankaŭ alergiema al ŝovinismaj kontraŭpolaj kaj kontraŭrusaj elpaŝoj. Kaj se estus kontraŭanglaj aŭ kontraŭgermanaj elpaŝoj, kiuj nuntempe malestas en Litovio, mi estus alergiema ankaŭ al ili.

T. Venclova, petita klarigi, kia devas esti la tolerema homo, menciis, ke plej gravas scipopovo starigi sin en pozicion de alia homo:

Kiel devas senti sin la judo, kiam ĉirkaŭe sonas antisemitaj frazoj? Kiel devas senti sin la ruso, kiam ĉirkaŭe oni parolas: "Rusoj estas okupantoj", "Rusoj estas drinkuloj kaj sentaŭguloj"? Kiel devas senti sin la ruso, se lia avo aŭ patro pereis dum la Dua mondmilito, kaj li mem faris nenion malbonon al Litovio. Kaj da tiuj rusoj farintaj nenion malbonan, estas la granda plimulto.

Kiel devas senti sin la polo, kiam komenciĝas sensensaj, anakronismaj pruvadoj, ke Vilno estas nia, ĉiam estis kaj estos nia. Sendube, estas ridinde, kiam homoj sidas en Vilno kaj krias "Mi sen Vilnius ne trankviliĝos".

Kiel devas senti sin la samseksamulo, kiam oni rikanas al li? Kiam vi povas, kiam vi ellernas starigi vin en pozicion de alia homo kaj senti vin tiel, kiel li povas senti sin, tiam vi eksentas kompaton kaj certan komprenemon kaj vi povas nomi vin tolerema homo. Kaj nuntempe en Litovio mankas homoj, kiuj kapablu kompreni alian pozicion. Ne nur la sian, tiun de samnaciono, de samideano, sed ankaŭ pozicion de alia homo.

El: <http://barelo.blogspot.com> (2010-01-03)

P.S. Okaze de Vilna UK en 2005 E-lingve aperis lia "Vilnius.Gvidlibro tra la urbo"

Ordinaraj ĝojoj

Ĉiuj homoj havas hobion, iuj eble eĉ kelkajn. Mia hobio estas du en unu: lingvoj kaj vojaĝoj. Jam la kvinan jaron mi frekventas Universitaton de Tria Aĝo en *Marijampolè*. Ĉi tie mi iom ellernis la anglan, perfektigis mian germanan, instruas Esperanton, kiam aperas dezirantoj ellerni ĝin. Ekde aŭtuno de 2009 en la universitato oni komencis instrui la polan kaj la francan. Mi komencis frekventi fakultaton de la pola, en kiu la lingvon instruas lektoro el Punsko (Pollando).

Universitataj studentoj kaj lektoroj tre multe vojaĝas. Jen decembre 2009, kune kun rektoro de nia universitato Onutė Sakalauskienė, ni feriiis en la Egiptia Ŝarm-el-Ŝejĥ (Ŝarm El Ŝeikh). En nia grupo estis 20 personoj el diversaj fakultatoj. Esperantistoj estis mi kaj estrino de E-fakultato Valė Česaitienė. En Egiptio ni vizitis Kairon, ties faman bazaron kaj muzeon. Ni vizitis impresajn piramidojn de Giza. Ĉe Ŝarm el Ŝejĥ ni navigis tra la Ruĝa maro per ŝipoj (kun vitraj fundoj), fotis koralojn, foŝojn kaj sinbanis. Decembre en Egiptio estas vera somero – la aera temperaturo estis + 23-28°, la akva + 22-23°.



Iuj el nia grupo de Ŝarm-el-Ŝejĥ iris al Jordanio kaj Izraelo. En Izraelo mi estis en 2000, kiam en Tel-Aviv okazis UK de Esperanto, tial mi restis en Egiptio kaj ne enuis tie. Mi multe komuniĝis kun lokaj egiptoj. En Ŝarm-el-Ŝejĥ eblas interparoli en la lingvoj angla kaj rusa. Foje unu egipto min paroligis ruse kaj demandis min ĉu mi estas rusino. Mi diris, ke mi estas litovino, instruistino de la rusa kaj de Esperanto. Pri la lingvo li nenion estis aŭdita kaj petis diri kelkajn vortojn en Esperanto, tion mi faris.

- Estas bela lingvo, - diris li.

- Estas facile ellerni ĝin, - diris mi kaj iom rakontis pri Esperanto.

Adiaŭante li invitis min veni al Egiptio kaj instrui lingvojn, aldoninte, ke mi ĉi tie povus multe perlabori.

Iam ni salutis egiptojn litove kaj ili respondadis: “Ho, labas, labas Lietuva!” (saluton, saluton Litovio). Jen estas la sekreto: litovoj ŝatas ripozi en Egiptio. Ja ĉi tie ĉiam estas varme, ĉiam multas suno, ĉi tie homoj estas sinceraj, ili salutadas kaj ridetas. Ĉi tie oni tre estimas aĝulojn, maljunulojn, gepatrojn. El Afriko al Litovio ni venigis multe da belaj impresoj, rememoroj, radion de Egiptia suno, kiu ankoraŭ longe varmigis niajn korojn.

Angelė Straleckienė, *Marijampolė*, 2010 01 04

Al UK kaj Centra Ameriko kun "Esperantotur"



Internacia Klubo „ESPERANTOTUR”, funkcianta kadre de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, daŭrigas agadon de MONDA TURISMO, kiu dum 1972-2002 disvolvis la internacian Esperanto-turismon. Bedaŭrinde ne sufiĉas esperantistoj por aranĝi nur esperantistajn vojaĝojn, tamen valoras daŭrigi Esperanto-turismon – tiel ni promocias Esperanton en turismo. Grupajn vojaĝojn aranĝas Internacia Klubo „Esperantotur” nur al tiuj Esperanto-aranĝoj, kiuj volas akcepti Esperanto-grupojn kaj ofertas bonajn aŭ almenaŭ akcepteblajn prezojn de turismaj servoj: loĝado, programo, ev. manĝado. En nia Kalendaro TEK-2010 ni anoncas vojaĝojn por Esperanto-aranĝoj, kies organizantoj sendis al ni prezojn por grupoj, ĉar la prezoj en interreto estas por individuaj. Ni anoncas Esperanto-aranĝojn ne nur por esperantistoj, ĉar nun ne eblas kompletigi grupojn nur el esperantistoj. Krome ni aranĝas malmultekostajn ŝipkrozadojn, kiuj certigas la plej altan komforton, riĉan vizitadon kaj programon ĉiutage en alia haveno kun ebleco uzi Esperanton sur kelkmlipersonaj ŝipoj en la tuta mondo.



INTERNACIA KLUBO "ESPERANTOTUR" OFERTAS VOJAĜOJN
al CENTRA AMERIKO laŭ *Itinero de Ernesto Hemingway* kun partopreno
en la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en HAVANO (17-24.07.2010)
kaj Konferenco ILEI en MATANZAS kaj 66 TEJO - Kongreson en LOS COCOS
en Kubo dum la 8-a de julio ĝis la 31-a de julio 2010 !

VOJAĜPLANO


- 08.07 Flugoj de grupoj A kaj B el Varsovio tra Parizo kaj Miami al Meksikourbo – ĉefurbo de Meksiko hoteltranokto.
- 09.07 Vizitado de Meksikourbo – i.a. : Centro Historico – Zocalo, Katedralo, ev. panoramo el Latinoamerika Turo kaj Nacia Antropologia Muzeo kaj ev. Tlateloko kaj Placo de Tri Kulturoj, hoteltranokto.
- 10.07 Fakultative vizitado de Guadalupe Baziliko, kaj sekve flugo el Meksikourbo al Havano, bustransfero al VARADERO, tranoktoj.
- 11.07 Ripozo ĉe belegaj plaĝoj de Meksiko Golfo, hoteltranokto en Varadero.
- 12.07 Bus-vojaĝo de A kaj C grupoj el VARADERO tra krokodilfermo al Playa Giron (Porka golfo) – Cienfuegos – TRINIDAD – vizitado de kolonia kaj monumenta urbo – heredaĵo de UNESCO, tranokto en hotelo aŭ ĉe kubaj familioj.
- 13.07 Busvojaĝo kaj vizitado– Trinidad – Sancti Spiritus – Camaguey – BAYAMO-vizitado kaj tranokto.
- 14.07 Busvojaĝo kaj vizitado:Bayamo – Holguin – Moa – BARACOA, tranokto en urbo kie unue venis al Kubo – Kristoforo Colon.
- 15.07 Busvojaĝo kun vizitado – Baracoa – Guantanamo – SANTIAGO de CUBA, hoteltranokto
- 16.07 Busvojaĝo kun vizitado - SANTIAGO de CUBA – Las Tunas – Ciego de Avila – SANTA CLARA – Mauzoleo de Che Guevara kaj fama Kirastrajno, hoteltranokto.
- 17.07 Busvojaĝo el Santa Clara al HAVANO – enloĝigo por semajno en hotelo kun matenmanĝoj, ricevo de kongresmaterialoj de la 95 UK, Internacia Esperanto Forumo kaj Internacia Vespero de la 95 UK, alveno kaj tranoktoj por grupoj A,B,C,D,E,F.
- 18.07 Partopreno en Inauguro de la 95 UK en Kongresa Palaco en Havano au plaĝo, fakultative vizitado de Malnova Havano, ev. Nacia Vespero, hoteltranokto.
- 19.07 Partopreno en la 95 UK, fakultative vizitado de Nova Havano, Tombo de Colon kaj ev. produkto de cigaroj, hoteltranokto.
- 20.07 Partopreno en la 95 UK, fakultative vizitado de Botanika Ĝardeno, Ekspozicio EXPO – KUBO ev. Lenin-Parko, hoteltranokto.
- 21.07 Busekskurso al Pinar del Rio–ev. vizitado de rum-produktejo kaj urbo VINALES, kaj Valo Vinales kun vizitado de Kavoj Cueva del Indio kaj rigardoj al belegaj mogotoj (mogotes) en Sierra de Los Organos, reveno al Havano por hoteltranokto.
- 22.07 Partopreno en 95 UK, fakultative busekskurso laŭ Hemingway – Itineroj. Hotel Ambos Mundos, Baro El Floridita, Marina Hemingway, Domo-Muzeo de Hemingway en Finca Vigla, jahxto „Pilar” kaj fiŝkaptista vilaĝo Cojimar, hoteltranokto.
- 23.07 Partopreno en la 95 UK kaj fakultative vizitado de urbocentro, kvartaloj: Vedado kaj Miramar kaj Placo de Revolucio kaj Malecon, 5 km maravenuo de Washington, Internacia Arta Vespero, hoteltranokto.
- 24.07 Partopreno en la Oficiala Fermo de la 95 UK forflugo el Havano au lasta adiaŭa vespero en Havano, hoteltranokto.
- 25.07 Flugo el Havano tra Cancun en Meksiko kaj al. MIAMI en Usono – vizitado de MIAMI kaj ev. Miami Beach, hoteltranokto.
- 26-30.07 Partopreno en ŝipkrozado per ŝipo „Majesty of the Seas” – USONO – BAHAMOJ – USONO
- 30.07 Reveno el ŝipkrozado al Miami, ev. fakultative vizitado de Nacia Parko Everglades kun famaj krokodiloj. Reflugo al Miami tra Parizo al. Varsovio (reveno 31.07.2010).

Aliĝoj kaj pliaj informoj ĉe: Internacia Klubo "Esperantotur",
 str.M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, rete: esperanto-turismo@wp.pl,
andreo@rubikon.net.pl, tur@esperanto.bydgoszcz.eu
 Retpaĝo: www.esperanto-turismo.za.pl POLLANDO

ESPERANTO KAJ AFRIKANOJ

En diversaj Afrikaj landoj la afrikanoj lernas Esperanton kiel duan lingvon internacian por komunikiĝi kun homoj el aliaj landoj tra la tuta mondo. Esperanto ŝanĝas la vivon de multaj el ili. Per Esperanto afrikanoj ekscias pri vivo en aliaj landoj, gajnas geamikojn kaj korespondas kun ili. Por litovaj esperantistoj sendube estas agrable, ke “Litova Stelo”, la revuo pri Litovio kaj litova E-agado, estas legata ankaŭ en Afriko. Estas, tamen, unu problemeto, la mona. Afrikanoj ne havas monon por aboni la revuon. Financan problemon ekhavis ankaŭ Litova E-Asocio, kiu antaŭe povis donace sendadis nian revuon al kelkaj afrikanoj (legu sube pri tio leteron de s-ro Sebuĥoro el Ugando al redaktoro de “Litova Stelo”). Tamen, eble, inter niaj abonantoj aperos tiuj, kiu povus aboni “Litovan Stelon” al certaj afrikanoj?

Por informiĝi pri Esperanto en Afriko legu: <http://www.esperanto-afriko.org> kaj retgazeton “Esperanto en Afriko” (por leteroj: afrika.officejo@esperanto.org).



Letereto el UGANDO:

Karega amiko afabla, jen mia familia fotoĵo perrete. Vi vidos mian edzinon antaŭ la stebmashino, la du gefilojn, kaj min kun mia edzino havanta nian kvaran bebon. Ni do havas kvar gefilojn.

Nuntempe mi ne ricevas vian litovan revuon, sed antaŭe mi ricevadis ilin regule perpoŝte.

*Eble vi forgesis mian nomon?
Jen ĝi estas:*

Honoré SEBUĤORO,
EGLISE CEBCE
REMER/DRCONGO.
PO BOX 08 BUNAGANA-
KISORO/UGANDA

Honoré Sebuĥoro
<honsebn@yahoo.fr>



FIDELA AL DIO KAJ PATRUJO

Alfonsas Svarinskas

Pli ol 2 mil kredantoj kolektiĝis en la antika Vilna arkikatedro por ĉeesti St. Meson dediĉitan al 85-jara monsinjoro Alfonsas Svarinskas. Vilna episkopo Juozas Tunaitis, kiu plenumis la Diservon, diris, ke servado de pastro Alfonsas estis markita de doloraj ekziloj en nordaj golgotoj, “tamen nenij minacoj kaj mokadoj de okupantoj rompis la pastron, kiu elektis fortikajn moralajn kaj spiritajn principojn. Li post la reveno el koncentrejoj daŭre obstine disvastigis lumon de kristana kredo, vekis nian popolon por spirita renaskiĝo”. Post la meso kelkcent da kredantoj kolektiĝis en Vilna oficira kunvenejo, kie estis legitaj multaj gratuloj (ankaŭ de Litova Prezidento Dalia Grybauskaitė), sonis salutparoloj de reprezentantoj de sociaj organizaĵoj kaj ŝtataj instancoj. Monsinjoro A. Svarinskas, dankinte al ĉiuj, kun ĉagreno memorigis, ke kvankam ni antaŭ 20 jaroj restarigis la sendependecon de Litovio, hodiaŭ ni veran liberon malhavas. “La ideoj de perforta ateismo, kiuj estis greftitaj en nian popolon, ne malaperis, sed mutaciitaj malice kaj imper-tinente penetras nian socian vivon kaj kripligas nian junularon”.

Monsinjoro Alfonsas Svarinskas, kontraŭsoveta rezistanto, aktiva defendanto de moralaj valoroj ĝenerale kaj de la tradicia familio speciale, naskiĝis la 21an de januaro 1925 en vilaĝo *Kairėnai* (distrikto *Ukmergė*). Lia la unua instruistino estis la avino, kiu instruis lin legi laŭ preĝolibro. En lernejoj laboris patriotaj instruistoj, kiuj edukis lin ami Dion kaj Patrujon. Post la fino de distrikta gimnazio, aŭtune 1942, li forveturis studi en Kaŭna pastra seminario. Tie la studentoj agis ankaŭ por aferoj de libereco. Decembre 1946 KGB* arestis seminarianon A. Svarinskas. Post trimonata kruela pridemandado kaj turmentado la milita tribunalo kondamnis lin al 10-jara labora reeduko en koncentrejo kaj posta 5-jara senrajteco. La punon li plenumis en Abeza koncentrejo, ĉe ĉirkaŭ-polusa cirklo (200 km suden de *Vorkuta*). En la koncentrejo la samsortulo episkopo P. Ramanauskas ordinis lin pastro. Pro malhumanaj kondiĉoj A. Svarinskas en la koncentrejo ekmalsanis je ftizo, tamen Dio savis la vivon kaj en 1956 li revenis Litovion. Ne por longe. En 1958 li estis denove arestita kaj punita por 6 jaroj pro tenado de kontraŭmarksisma, kontraŭsoveta literaturo. En 1961 Supera juĝo de Litova soveta respubliko agnoskis la pastron “precipe danĝera recidivulo” kaj enprizonigis lin en Mordovia koncentreja prizono, kiu titoliĝis “Ŝtona sako”. Vintre tie oni hejtis nur ĉiun duan tagon, sinlavadon kaj fiziologian necesfaradon oni permesis nur unufoje diurne, trinki - nur duonlitron dumtage.

Post denova reveno ŝtatoficuloj permesis al A. Svarinskas pastri nur post paso de 20 monatoj. A. Svarinskas kunlaboris en nelegala “Kroniko de litovaj katolikoj”

kaj kune kun aliaj pastroj fondis Katolikan komitaton por defendi rajtojn de religiuloj. En 1983 li estis denove arestita kaj trafis al koncentrejo de Permeo. Tamen la laboro de la komitato donis rezultojn. En 1988 Usona Prezidento R. Reigan dum la Moskva vizito petis al M. Gorbačov liberigi lin. Samjare li estis ekzilita el Sovetunio – al Germanio – ĝis ruiniĝo de Soveta imperio. Entute A. Svarinskas pasigis eĉ 22 jarojn en sovetaj malliberejoj kaj koncentrejoj, li tamen restis “ŝulda” al soveta reĝimo ankoraŭ 5 jarojn da mallibereco... Post tiam A. Svarinskas eĉ 11-foje renkontiĝis kun Papo Johano Paulo II. En 1990 Papo atribuis al li la honoran titolon monsinjoro. Kiam A. Svarinskas revenis en Litovion, li laboris kiel kanceliero de litova kardinalo V. Sladkevičius, kiel ĉefkapelano de Litova armeo, kiel pastro en kelkaj litovaj preĝejoj.



Monsinjoro Alfonsas Svarinskas estis honorita per Komandora kruco de ordeno de Rajdpelanto (1998), medalo de Litova sendependeco (2000) kaj medalo de Volontuloj de fondintoj de litova armeo (2001). Pro batalado por homaj rajtoj li ricevis diplomon en Detrojto (Usono), premion de urbo Pueblo (Meksikio), Venezuelan honorigon “Il Grand Cordon”. Li estas honora civitano de urbo Lecco (Italio).

La jubileulo antaŭ nelonge diris: “Mia vivosuno jam malleviĝas. Mi dankas Dion pro la trairita vojo. Mi ne dezirus ĝin ŝanĝi aŭ fordoni al iu alia. Mi kredas, ke Litovio pli aŭ malpli frue ricevos plenan liberon kaj sendependecon”. Li admonis la homojn zorgi ne nur pri ekonomiko, sed ankaŭ pri spirita vivo kaj instigis: “... virta, sobra vivo, civitana aktiveco kaj kuraĝo estas la klaŭzo por postvivo de Litovio”.

V. Miklašėnas, foto de J.Šėduikis

* KGB – Komitato de ŝtata sekureco (ruse).

ESPERANTO – MOZAIKO

☆ **Kantoj, Kantoj!** Dum la pasintaj 40 jaroj eldoniĝis preskaŭ 300 muzikaj albumoj kun Esperanto-kantado. Lu Wunsch-Rolshoven el Germanio "lu.esperanto@gmx.de" metis la liston de tiuj muzikalbumbuoj al vikipedio, ĉe

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-muzikalbumbuoj>

Laŭteme ligita retejo estas la kolekto de tekstoj kaj muziknotoj de Esperantaj kantoj, trovebla ĉe: <http://ikso.net/kantaro/>

☆ **E-libro-katalogo.** En Retbutiko aperis nova katalogo de la internacia libroservo "Retbutiko" kun 50 paĝoj da interesaj informoj. Jen la ĉefaj ĉapitroj:

* Prozo / * Poezio; * Noveloj – Rakontoj; * Por infanoj; * Por komentantoj; * Ekonomio; * Historio; * Scienco; * Esperantologio; * Vortaroj; * Kursoj; * e-libroj; * ktp ktp.

La katalogo estas senpage elŝutebla ĉe <http://retbutiko.esperanto.be>

☆ Ĉu vi jam konas la novan interretan vortaron de Esperanto en la retejo *dict.cc*? Jam de iom da tempo, *dict.cc* estas la plej ampleksa germana-angla reta vortaro. Nun aldoniĝas pluraj lingvoj al ĝi, kaj de tri monatoj Esperanto estas unu el ili. La principo de *dict.cc* estas tio, ke ĉiuj uzantoj povas kontribui al la pliampleksigo kaj plibonigo de la vortprovizo. Oni povas proponi

novajn kapvortojn, evolui la prezentojn de aliaj uzantoj (por ke ili eniru la vortaron) aŭ proponi korektojn. Ĉar la E-vortaro (aŭ fakte ĉiu vortaro krom la angla) estas tre nova, la vortprovizo estas ankoraŭ malgranda, sed ni ĉiuj povas helpi ŝanĝi tion. Do rigardu la retpaĝon, kaj se vi volas, registriĝu kaj kontribuu! Jen la ligilo: <http://deeo.dict.cc>

Martin Brüggemeier
martin.brueggemeier@freenet.de

⌘ KORESPONDA KESTO ⌘

Se vi interesiĝas pri korespondado kun **japanoj**, bonvolu turni vin al:
Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
TOKIO, Japanio

Skribante korespond-peton bv. indiki vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj preferojn

☆

Korespondpropono el **Afriko**
Mi estas togolandano, vicprezidanto de la junulara sekcio de nia landa asocio. Mi verkemas kaj amas vojaĝojn. Skribu al mi!
Antaŭdankon ! Deef De RITUEL
deefderituel@hotmail.com

☆

Atenton, korespondantoj! Kune kun via koresponda anonco ne forgesu sendi al litovastelo@takas.lt ankaŭ vian foton, kiun ni publikigos kune kun via anonco!

RIDETU KUNE!



☺ PRI VIRINO

Viro demandas al la Dio:

- Kial Vi kreis virinon?
- Por ke vi havu kiun ami!
- Sed, mia Dio, kial vi kreis tian stultan?
- Por ke ŝi vin amu ...

☺ SORTO DE DIABETIKULO

Diabetikulo foriris kun sia edzino promeni. La edzino rimarkis, ke la edzo avide ekokulumis al preterirantaj belulinoj.

— Kara, ne forgesu - ĉiuj dolĉaĵoj malkonsilendas al vi!

☺ DANK` AL AMIKOJ KAJ MALAMIKOJ

Oni interesiĝas:

- Kial vi tiom dikiĝis?
- Ĉar matenmanĝon formanĝas mi mem, tagmanĝon kun mi disdividas miaj geamikoj kaj malamikoj fordonas al mi sian vespermanĝon.

☺ GENELOGIO

— Miaj familiaj radikoj atingas Aleksandron la Grandan! – fanfaronis Kristina kaj demandis al sia amikino: Kiu estas via origino?

— Mi ne scias, - respondis tiu. – Ĉiuj niaj familiaj registroj malaperis dum la diluvo ...

☺ REALIĜONTA REVO

Renkontiĝis juĝisto kaj prizona estro. Juĝisto:

- Kial vi estas tiom enpensiĝinta?
- Tedis al mi tia vivo: tiom da jaroj min ĉirkaŭas nur murdistoj, friponoj kaj ŝtelistoj! Kiel mi revas, ke ĉirkaŭ mi estu honestuloj, sinceruloj kaj pravuloj!

Juĝisto:

- Vi pri tio nur revas kaj mi jam laboras, ke tio efektiviĝu!

PERANTOJ *de* LITOVA STELO

BELGIO: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 ANTWERPEN
 BELORUSIO: Eŭgenija Pečkova, Nadeždinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK
 BRAZILIO: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR 70084 – 970 BRASILIA, DF
 BRITIO: Viv O` Dunne, Stacion Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST 12 9DE
 ĈEĤIO: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 PODĚBRADY II
 DANIO: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK-2100 KØBENHAVN Ø
 ESTONIO: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 KURESAARE
 FRANCO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS
 GERMANIO: EsperantoLand e. V. Berlin, s-ro Lu Wunsch-Rolshoven,
 Wiciefstrasse 9, DE-10551 BERLIN
 HISPANIO: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 SABADELL
 ITALIO: Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875
 IRLANDO: Rūta Vaičiūnaitė, DUBLINO, ruta64@centras.lt; tel. +353 8762 78929
 LATVIO: Margarita Želve, Rūpniecibas 35-13, RĪGA LV-1045
 MAKEDONIO: Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP
 NEDERLANDO: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM
 POLLANDO: Robert Kaminski - ul. Kwiatowa 1 m 3, PL-94-227 LODZ, lodzano@nestrada.pl
 RUSIO: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD
 SVEDIO: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 –35 HÖRBY
 UKRAINIO: Mikaelo Lineckij, av. Heroj Stalingrada 42-v-64, UA-04213, KIEV;
ml@esper.kiev.ua
 USONO: E.L.N.A., Esperanto-USA, 1335, Stanford Ave Suite 300, Emeryville Ca 94608

PERANTOJ EN ALIAJ LANDOJ ESTAS SERĈATAJ!

La revuon Litova Stelo vi povas aboni ĉe la perantoj, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la administracio de Litova E-Asocio (LEA, ab. D. 167, LT-44002 Kaunas-C; litova.ea@mail.lt).

Se vi ĝiros la pagon rekte al nia konto *litv-s* ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando, vi pri tio mem nepre informu la administracion de LEA (ne la redaktoron) kaj sendu al ĝi via(j)n adreso(j)n.

ATENTU LA ABONPREZOJN ! Ili ne altiĝis !!

Por Litovio: jarabono 20 Lt; unuopa n-ro 4 Lt; malnova jarkolekto 10 Lt.
 Por landoj de eksa Sovetio: jarabono 7 €;
 unuopa n-ro 1,50 €; malnova jarkolekto 4 €.
 Por eksaj socialismaj landoj: jarabono 10 €; unuopa n-ro 2 €;
 malnova jarkolekto 5 €.
 Por ceteraj landoj: jarabono 14 €; aerpoŝta aldono 6 €;
 unuopa n-ro 3 €; malnova jarkolekto 7 €.

*Pro falanta kurzo de USD ni indikas abonprezojn nur en EUROj.
La abonado senlimdata! - ĉiu aboninto ricevos ses numerojn de la jaro!*

Lietuvos žvaigždė ISSN 1648-4185 Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas

2010 m. Nr.1. Baigta redaguoti 2010.04.24.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. 10-...

Spaustuvė "MORKŪNAS ir Ko", Draugystės g. 17, LT-51229 Kaunas-31.